

Kurt Morawietz,
En la nokto

tradukita de Manfred Retzlaff

Atendis mi vin tie ĉi.
La lumon dum la nokto mi
Ne estis estinginta.

La florbukedo kaj la vin',
Por vi ĝi estis - kredu min.
Ne estas vi veninta.

Ne scias la kialon mi
Kaj kiun buŝon kisis vi.
Ĝin scias eble iu.

Nur tion ja deziras mi :
Ke iu estu apud vi
Kaj vin konsolu tiu.

*Traduko de la Germana poemo "In der Nacht" de Kurt Morawietz
en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2011-02.*

MR-515-01 / Arg-843-1698 (2013-02-26 22:47:12)

Kurt Morawietz,
In der Nacht

Nun ist das Haus zur Nacht gericht',
In stiller Stube brennt noch Licht,
Die Fenster sind verhangen.

Der Blumenstrauß, im Krug der Wein,
Sie sollten deine Freude sein.
Du bist vorbeigegangen.

Weiß nicht, wohin der Wind dich trieb,
Noch welcher Mund dir heute lieb.
Die Sterne werden's wissen.

Wär einer dir nur Fahrtgesell
Und machte deinen Kummer hell
Und weich und kühl dein Kissen.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas Kurt Morawietz.

Arg-843-1697 (2013-02-26 22:29:59)

Tiu ĉi poemo aperis en 1972 en la libro "Ostwärts-Westwärts" (= Orienten-Okcidenten). Pri la verkinto vidu la vikipediejon http://de.wikipedia.org/wiki/Kurt_Morawietz.